


SALUTO DE LIA EMINENCO KARDINALO MILOSLAV VLK al la 59-a Kongreso de IKUE en Velehrad



Karaj gesamideanoj,

mi salutas la 59-an kongreson de la katolikaj esperantistoj okazantan en Velehrad kaj mi deziras al ĉiuj viaj aktivadoj Dian benon kaj sukceson. Mi rememoras, ke dum miaj renkontoj kun esperantistoj en mia junaĝo min tre alparoladis ne nur internacia lingvo mem, sed ankaŭ ideoj de interkompreniĝado inter la homoj, inter la nacioj.

Mi estas profunde konvinkita, ke tiu ĉi belega ideo estas nuntempe pli ol iam antaŭe aktuala.

Mi deziras al la kongreso ĝojan etoson en reciproka interkompreniĝo kaj benitajn aktivadojn en laboro por interpaciĝo kaj interkompreni_o sur internacia kampo.

Via Kardinalo Miloslav Vlk
Ĉefepiskopo de Prago kaj Primaso Ĉeĥa

A handwritten signature in black ink, which appears to read 'Miloslav Vlk'.